



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245 - BARCELONA



RIPOLL ATENDAS VIN

Jen ni havas antaŭ ni la belajn kongrestagojn de nia XVII. Ni ĉiam nin sentis optimistoj kaj estis konvinkitaj, ke nia Kongreso en la fama Ripoll havos eksterordinaran sukceson kaj nun, ĉe la sojlo de la bela festo, ni estas certaj, ke niaj samlandanoj estas tiel same konvinkitaj kiel ni, ke la XVII Kataluna Esperanto-Kongreso havos eksterordinaran reliefon en la

historio de la Esperanto-movado en Katalunujo. De ĉiuj flankoj venas al ni kuraĝigaj vortoj kaj novaj grupoj aliĝas al KEF. Ŝajnas ke fine oni komprenis la kialon de nia propagando por kataluna esperanto-fronto kaj la esperantistoj respondas al nia alvoko kun fervoro kaj entuziasmo. La gvidantoj de KEF sentas la respondecon de la momento kaj estas pretaj doni sian tutan povon kaj kapablecon por eltiri el la favora situacio la plej bonan rezulton por la bono de nia afero. Ju pli da batalantoj staros apud la standardo de KEF, des pli da bonaj sekvoj premios nian taskon. Se iam oni povis supozi, ke niaj klopodoj estas vanaj, nun oni devas konstati, ke ni staras sur ĝusta vojo kaj iras ĝin kun sukceso.

Ripoll, kiu en sia historio havas la altan meriton esti la kreinto de la kataluna nacio, Ripoll kun la valoraj ŝtonoj de siaj centjaraj monumentoj havos novan reliefon en la historio de esperanto; ĝi estos la fundamento de la nova periodo de kreskanta KEF, kaj donos al la esperantistoj la ekzemplon de laboro kaj persisto por nobla idealo. Ripoll forĝos, kiel ĝi forĝis en pratempo la plej bonajn laborilojn de la homo, la sorton de nia esperanto-movado enlanda, kaj ni estas certaj, ke ni ricevos la plej taŭgajn kaj bonajn laborilojn por tratabi antaŭ ni larĝan kaj ebenan vojon al la triumfo.

Ripoll atendas vin. Venu grandnombre al ĝi. Viaj sugestoj kaj iniciatoj renkontos varman akcepton. De vi ĉiuj dependas la estonto de KEF. Helpu per ĉiuj fortoj. La elekto de la plej kapablaj, spertaj kaj laboremaj estraranoj estas la angula ŝtono de la Kongreso. Ni ĉiuj havas la devon alporti al la komuna laboro nian fervoron kaj ardon de nia esperantista koro.

Pruvu ankoraŭfoje, ke la flamoj de via entuziasmo ne nur ne estingiĝis sed ke ili pli vigle flagras. Ĉiuj al la Kongreso kun larĝa koro kaj batalpretaj!

Kongresaj sciigoj

Vojaĝo. — Ni rekomendas al ĉiuj kongresanoj uzi la oficialan vagonaron, kiu forveturas de Placo Katalunujo, Nordlinio, matene je la 6,20. Tiamaniere oni povos ĉeesti la Malferman Kunsidon kaj la alveno de multnombra kongresanaro estos pli impona. La esperantistoj, kiuj loĝas en aliaj urboj kaj ne povas alveni al Barcelono pli frue, estas petataj veturi per la sekvanta vagonaro. Vidu pli malsupre la hortabelon.

Kongresinsigno. — Ĉe la Malferma Kunsido oni donos al ĉiu kongresano la insignon. Ne forgesu porti ĝin dum la kongrestagoj.

Standardoj. — Kiel kutime oni rekomendas, ke la grupaj standardoj ne manku ĉe la Kongreso. Ni esperas, ke ĉiu grupo portos la sian por plireliefigi la alvenon de la kongresanoj kaj la ĉarmon de la festoj.

Salutado de delegitoj. — La delegitoj, ĉe la Malferma Kunsido, post la parolado de la prezidanto, povos

alparoli la kongresanojn. Por tio estas necese, ke ĉiu delegito prezentu sian rajtigilon al la sekretario. Ĉiuj grupoj, ĉu membroj aŭ ne, povas sendi delegiton.

Ekzamenoj. — Bonvolu sin anonci kiel eble plej baldaŭ la samideanoj, kiuj volas sin prezenti al la ekzamenoj. Por tio oni turnu sin al la O. K. de la XVII Kataluna Esperanto-Kongreso, Ripoll. Oni devos pagi la kutiman sumon por la diplomoj de *kapableco* kaj *profesoreco*.

Ekspozicio. — Helpu la organizon de la Esperanto-Ekspozicio sendante kiel eble plej multe da materialo al la O. K. Oni plej zorge atentos pri ĉiu ricevita prunto kaj ĉio estos ĝustatempe resendita.

Gastigado. — Ni rekomendas, ke oni antaŭmendu ĉambrojn por eviti konfliktojn kaj ĝenojn. Ripoll estas tre vizitata de turistoj dum Pentekosto kaj ordinare ĉiuj hoteloj kaj gastejoj estas plenaj. Vidu la anoncojn sur tiu ĉi numero kaj faru tuj vian mendon.

Festeno. — La Oficiala Festeno okazos en Fonda Paiet kaj ĉiu bileto kostos 12 ptojn. Estas nepre necese sin anonci antaŭe por ebligi la organizon. Se vi ne sendis ankoraŭ vian aliĝon, uzu la aliĝilon, kiun ni sendas kun tiu ĉi numero.

Ekskurso. — Multaj aliĝoj estas jam ricevitaj kaj verŝajne la ekskurso al la bela Cerdanya estos grandega sukceso. Se vi volas uzi la unikan okazon viziti je plej favora prezo (10 ptoj.) la Pirenean regionon, sendu senprokraste vian aliĝon uzante la kunsendatan aliĝilon.

Prezoj. — Jen kelkaj interesaj informoj pri la hoteloj:

<i>Fonda Paiet,</i>	tuttaga pensio	10	kaj 12 ptoj.
<i>Continental Hotel</i>	»	12 ^{1/2}	» 15 »
<i>Hotel Monestir</i>	»	13	»
<i>Fonda L'Estrella</i>	»	10	»

Aldonu al la montritaj prezoj 10 % escepte al tiuj de *Fonda Paiet*.

Kongreslibro.—Okaze de la Kongreso nia amiko Ferran Montserrat eldonas tre interesan gvidlibron de Ri-

pollès kun multaj fotografajoj kaj tre interesaj informoj pri la Kongreso. La kongresanoj povos ĝin aĉeti por du pesetoj. Membroj de K E F pagos por ĝi nur 1,50 pesetojn. Ni varme rekomendas la libron ne nur pro ĝia alta kvalito sed ankaŭ por premii la taskon de la eldoninto.

Vagonaroj. — Jen hortabelo de la vagonaroj inter Barcelona kaj Ripoll:

*Forveturo de Barcelona**Alveno al Ripoll*

*6,20	8,49
8,15	11,12
*10,20	12,34
*13,10	15,25
14,15	16,20
16,45	19,27
*19,20	21,45

*Forveturo de Ripoll**Alveno al Barcelona*

6,42	*9
7,55	11
9,30	11,30
11,06	*13,25
13,31	*15,55
11,50	*18,25
17,32	*19,55
18,15	21
20,20 (nur dum festotagoj)	22,20

La per steleto signitaj vagonaroj havas kiel deir- aŭ alvenpunkton Placo Katalunujo. La ceteraj havas tiun de Nordstacio.

Prezo de la biletoj Barcelona-Ripoll: 2-a klaso, 9,75 pesetoj; 3-a klaso, 6,15 ptoj.

Kongresafiŝo. — Ni dissendis al ĉiuj esperantistaj grupoj ekzempleron de la diverskolora afiŝo eldonita de la Organiza Komitato.

XVI.^{aj} INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

VERDIKTO

ORDINARAJ TEMOJ

Originalaj Tekstoj.

I Originala versaĵo kantanta «Amon». Natura Floro al la verko n-ro 89, «Mia Amo», devizita «Najtingall»

Unua mencio al la verko n-ro 90, devizita «Utopio». Dua menciinda verko n-ro 94, devizita «La am' de mia kor'...». Tria menciinda verko n-ro 75, devizita «Nostalgia fantazio». Kvara mencio al la verko n-ro 97, devizita «La ekesto de la amo».

II Originala ama verko en prozo. Premiita verko n-ro 45, devizita «Vivo morto kaj Amo».

Tradukitaj Tekstoj.

I Traduko de unu versaĵo de la kataluna poeto Maragall. Ne konkursita.

II Traduko de la kataluna rakonto «Sobre la mandra», de Prudenci Bertrana. Premiita verko n-ro 32 - devizita «Nenian vorton krom la fundamentaj». Oni aljuĝis al tiu ĉi traduko la premion de 50 pesetoj malavare donacitan de Sinjoro Ramon Soler, ne antaŭe anoncitan kaj kiel surprizon por la gajnito. Mencio al la verko n-ro 33 devizita «Ĉu bonstille...?»

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

Difinitaj Temoj

Premio de Kataluna Esperantisto: Dumviva abono al la gazeto. Temo: «Kiel oni faras bonstilan versan tradukon». Ne konkursita.

Premio de Literatura Mondo: Ekzemplero de Enciklopedio de Esperanto ilustrita eldono al la originala noveĵo n-ro 72: «Ĉu kulpo aŭ sorto?» devizita «Siberio-Tomsk 1920».

Premio de Esperanto-Grupo Vic: 50 ptoj Temo Komedito kun kvin roloj.

Premiita verko n-ro 52 - devizita «La Edziĝontoj».

Premio de La Pirato: 50 ptoj. Temo Kion, laŭ internacie aplikata kodo, bonedukita homo ne devas fari. Premiita ver-

ko n-ro 67 - La bonedukita homo, devizita «Bonhumoro-sana koro».

Premio de Cooperativa Económica Ripollense, 50 pesetoj. Temo: Prozo aŭ verso laŭdanta la kunhelpadon. Premiita verko n-ro 111 - devizita «Koooperatismo kaj Esperanto».

Premio de «Literatura Mondo», jarkolekto de 1934 al la originala poemo n-ro 77 devizita «En malbona humoro».

Premio de «Literatura Mondo» jarkolekto 1932 al la originala poemo n-ro 68 - devizita «Bonhumoro-sana koro».

Premio de «Espero Katolika» dujara abono al la gazeto. Verko n-ro 98 «Pli da amo kaj komprenemo».

LIBERVOLAJ TEMOJ

Originalaj versaĵoj.

Premio de la Urbestro de Ripoll: 100 pesetoj. Oni dividis la premion kaj aljuĝis du 50 pesetajn premiojn al la verkoj n-ro 74 devizita «Homoj kaj laboro» kaj verko n-ro 100 devizita «Amo al Dio nekonata».

Unua mencio al la verko n-ro 88 devizita «Abelo» — Dua mencio al la verko n-ro 79 devizita «Amo kaj belo sub la verda stelo».

Tradukitaj versaĵoj.

Premio de Esperanto Societo «Paco kaj Amo» 50 pesetoj al la verko n-ro 12 devizita «Naŭ teatraĵoj».

Premio de Esperanto Grupo «Barcelona Stelo» 50 pesetoj al la verko n-ro 13 devizita «Naŭ sonetoj».

Premio de «Heroldo de Esperanto» de valoro proksimume 50 pesetoj al la verko n-ro 39 devizita «The Pied Piper of Hamelin».

Menciindaj verkoj n-ro 27 «Tri poemoj de Wordsworth», n-ro 107 «Pjotr Plorulin - Poemo sentimentala» kaj n-ro. 101 «Donna Klara».

Originalaj prozaĵoj.

Premio de la Estraro de K. E. F. 50 pesetoj al la verko n-ro 71 - Porcelana Idilio.

Premio de la Prezidanto de K. E. F. 50 pesetoj, premiita verko n-ro 30 devizita «Popollegendoj aŭ folkloro».

Menciindaj verkoj n-ro 48 «La lunhomo», n-ro 46 «Pen-seroj surparere» kaj n-ro 73 «La ĉina juĝo kun torturoj».

Tradukitaj prozaĵoj.

Premio de Esperanto-Grupo Ripoll, 50 pesetoj. Premiita verko n-ro 34 «Jakob Brunner».

Premio de «Casino de Ripoll» 50 pesetoj. — Premiita verko n-ro 35 «Homoj en milito».

Menciinda verko n-ro 40 Rakonto de Israel Zangwill.

Laŭ la regulo II de la regularo de la Konservantaro de la Floraj Ludoj la verkoj premiitaj fariĝas propaĵo de la Konservantaro kiu zorgos pri ilia publikigo sur KATALUNA ESPERANTISTO aŭ aliaj esperantaj gazetoj. Eventuale oni petu al la Redakcio de «K. E.» permeson por reprodukto.

Majo de 1935. — Saldanha Carreira, prezidanto. Maria Elworthy-Posenaer. S. Alberich Jofrè. Eduard Capdevilla. Joan Gili Norta, Sekretario.

RIPOLL KAJ ĜIAJ MONUMENTOJ

Urbo kun 7,106 loĝantoj situanta je 678 metroj super la marnivelo en la centro de la regiono nomata Ripollès kaj en la kunfluejo de riveroj Ter kaj Freser, je 106 kilometroj de Barcelona. Stacio en la fervoja linio de Barcelona al Puigcerdà de kiu ĝi staras je 50 kilometroj. En ĝi renkontiĝas diversaj ŝoseoj por veturi al regiono Campródon kaj valo Ribes, Olot, k. t. p. Tre grava industria centro kun reliefaj komercentreprenoj. Ĝi havas diversajn fabrikojn de teksaĵoj, cemento, farunoj, anizaĵoj, tanaĵoj, nutraj pastoj, ferfandadoj, elektroteknikaj konstruaĵoj, k. t. p.

Ĝiaj foiroj, kiuj estas tre ĉeestataj, okazas la 15-an de oktobro. Ĉiudimanĉe ĝi havas ankaŭ gravan foiron. La unuan dimanĉon de aŭgusto kaj la dek-unuan de majo ĝi havas siajn ĉefajn festojn.

Multaj el ĝiaj stratoj estas mallarĝaj sed bone pavimitaj kaj urbstilaj; ĝi kalkulas je kvar placoj kaj kelkaj placetoj. En unu el ili kaj sur tereno aparteninta al la monaĥejo staras la Urbdomo, konstruaĵo kun certa antikva trajto kaj ia grandiozeco. En la mezo de tiu ĉi placo oni povas vidi monumenton el fero je la memoro de la mortintoj en la brulo kaj detruo tuta de la urbo okaze de la antaŭlasta karlista mi-

lito. La foirplaco, hodiaŭ nomata 27-a de majo, gardas antikvegajn konstruaĵojn kun malnovaj arkadoj. En tiu nomata Abato Oliva troviĝas la antikva monaĥcambro kaj la malnova preĝejo Sankta Petro. Paro da pontoj super Freser, kunligas ĵambaŭ bordojn.

Sur la montoj, kiuj je la nordo enfermas la urbon, staris diversaj ermitejoj, hodiaŭ en ruina stato. La plej grava estis tiu nomata Catllar, staranta sur la supro, je alteco de 1,075 metroj, de la montĉeno dividanta la valojn Freser kaj Les Llosses. En tiu ermitejo oni povas ankoraŭ hodiaŭ rimarki kanonvolbon pintfiksitan. La bildo kiun oni adoris, havas hodiaŭ kapeleton en preĝejo Sankta Eŭdaldo.

Kio vere donis famon al Ripoll kaj per si mem meritas atentan viziton, tio estas ĝia monaĥejo Sankta Mario, fondita de Guifré I, unua graforeĝo de Katalunujo. Ĝia portalo, verko el la XII jarcento, estas belega triumfa arko. La altaj kaj bareliefoj estas prilaboritaj de spertaj manoj. En ĝi oni sukcesis kunligi mirige la estinton, la estanton kaj la estonton de la religio de Jesuokristo; kaj kiel tre bone diris Pellicer, admirante ĝin, la animo povas ĝui la sublimajn rememorojn de la patriarkoj, grandaj reĝoj kaj profetoj; mirrigardi la mirbelajojn, kiujn Dio faris por sia popolo por konduki ĝin al la promeslando; tie aperas la du kolonoj de la eklezio, Petro kaj Paŭlo, kiel ankaŭ la plej mildaj kaj mirigaj paĝoj el la unuaj jaroj de la leĝo de graco; tie estas kategorie gravurita la eterna batalo de la bono kaj malbono, la paganismo venkita, la vero triumfanta, la Sanktega Triunuo, la dia Ŝafido, la antikva leĝo, kaj la libro de la sep stampoj, k. t. p. La Biblio, kiel brileganta suno, disverŝas radiojn diecajn sur ĉiun retablon, la alegorio ilin poezibeligas, la mito ilin ĉarmigas, la imago ilin variigas, kaj la senmovaj figuroj en ŝajna nekohereco, tuj kiam projekciiĝas sur ilin la lumo de la sanktegaj versaĵoj kaj la kantoj de la poetoj, akiras unuecon, vivon, animecon, movon kaj eĉ parolon.

La interno de la templo per sia severeco kaj grandeco de linioj kortuŝas. Ĝia planko estas latinkruca kaj kun tri navoj, la du flankaj pli malaltaj. Ĝi estas sesdek metrojn longa kaj naŭ larĝa: la transepto havas longecon de kvardek metroj. Ĉe la kunligo de la centra navo kun la absido kaj la brakoj de la transepto stariĝas lanterno ovoforma, kiu donas lumon al la centro de la preĝejo. La galerioj aŭ navoj flankaj havas po kvar metroj kaj estas dividitaj de la centra navo per masi-

NIA BELA KONGRESURBO




Ĝenerala vidaĵo de la urbo.




Parta vidaĵo de la urbo.




Monaĥejo de Ripoll. Fasado kaj sonorilturo.



Flanka navo, apud la Sakristio.



Interno de la preĝejo.



Ĝenerala vidaĵo de la klaŭstro kun la tuta primitiva alo.

vaj kvadrataj pilastroj kaj inter si per kolonoj ornamitaj per romanikaj kapiteĵoj. La fronto de la ĉefa altaro estas romanika kopio el la preĝejo Sankta Petro, hodiaŭ en la dioceza Muzeo de Vic. La ĉefaltaro, lokita en la centra absido, estas laŭ moderna konstruado kaj respondas laŭ siaj linioj al la stilo reganta en la templo. La retablo ĝin prezidanta estas bela mozaiko prilaborita en la metiejoj de la Vatikano: ĝi reprezentas Sanktan Marion de la Monaĥejo de Ripoll, laŭ rimarkinda pentraĵo de la kataluna artisto Enric Serra. Ĝi estis donacita de papo Leono XIII. En ĉiu absidido estas ankaŭ ĝia altaro. Vokas la atenton Virgulino de la Roser, belega skulptaĵo el marmoro de la artisto Llimona. Ĉe la alia altaro oni adoras bildon de Sankta Georgo konstruitan en la metiejoj de Kristana Arto en Olot, kaj ankoraŭ bildon de Sankta Rajmondo de Penyafort, originalaĵo de skulptisto Venanci Vallmitjana. Rimarkindigas en la ekstremo de la transepto la tombo de grafo Ramon Berenguer III. Ĉe la alia ekstremo de la transepto estas la urno en kiu oni gardas la restaĵojn de grafo Guifré; ĉe proksima angulo oni vidas memorigan sanktversajon dediĉitan al la grafo de Barcelona Ramon Berenguer IV. En la centra navo kaj ĉe alta loko estas sarkofagoj tre videblaj, kiuj enhavas la restaĵojn de la grafo de Besalú, Bernard Tallaferro, tre eleganta, prilaborita en Olot, el enlandaj materialoj; ĉe la alia flanko estas deponitaj la mortcindroj de la filo kaj de la nepo de la sama grafo; la unua ĉe la flanko de la Epistolo, pagita de la konata bienulo Ramon Noguer el Sagaró, gardas la restaĵojn de Rodulf, episkopo de Urgell, filo de grafo Guifré; en la alia, nur per simpla drapo kovrita, oni gardas la ostojn de abatoj Bertran kaj Ramon Desbach. En la centro de la templo, iom pli supre de la ujo de benita akvo, ni vidas la tomban sanktversajon de episkopo Morgades. Pendigita je la volbo flagras bela standardo, donaco de Arkeologia Societo de Mataró. Enirante en la templon kaj ĉe la dekstra flanko oni renkontas la riĉan altaron dediĉitan al Sankta Joakimo, pagitan de Joaquim Prats Rodés. Ĉe la kontraŭa flanko estas la baptokapelo kun prilaboritaj reliefaĵoj, pagita de Centre Excursionista de Catalunya.

En la kupolo, kiu havas la samajn trajtojn de la monumento, estas sep kornicplatoj dekoritaj per delikategaj pentraĵoj. Ili reprezentas la Morton de la Dipatrino, la vespermanĝon de Sankta Beneto kaj Sankta Eskolastiko, la Anunciacion, la klaŭstron de la Abatejo de Sankta Johano, la dioferon de Ro-

dulf al Sankta Mario, la monaĥejon de Montserrat kaj reprezenton de la origina peko kaj de la promeso de repurigo.

Apud la templo kaj ĉe la sama flanko de la sonorilejo kaj je pli malalta nivelo, estas la klaŭstro. Ĝi estas kvarangula kaj konsistas el du galerioj surmetitaj, dividitaj de ligna plafono, kies interplekto, kiu laŭdire estis ĉefverko de pentrarto, malaperis. Ducent kvardek kolonoj kun la respondaj kapitejoj kaj abakoj, subtenas la kvindek kvin arkadojn el kiuj konsistas tiu ĉi klaŭstro, kiuj, kiel diris niaj artistoj, havas neordinaran inspiron kaj grandiozecon. La fustoj de la antikvaj kolonoj estas el ruĝeca jaspo. La stilo de la kapitejoj kaj abakoj respondas al la skulptaj karakterizoj de la diversaj epokoj dum kiuj ili estis konstruitaj. La primitiva alo, laŭ romanika skulptstilo el la XII jarcento, estas la malsupra galerio alkroĉita al la navoj de la templo. La tri aliaj malsupraj galerioj kaj la kvar supraj havas gotikan skulptstilon el la XIII kaj XIV jarcentoj. En la kapitejoj kaj abakoj kun granda fantazio estas skulptitaj sanktuloj, anĝeloj, homoj, animaloj, drakoj, sirenoj, vegetaĵaj alegorioj k. t. p. Ŝajnas, ke tiuj ĉi skulptaj komponaĵoj estas ne nur ornamaĵoj, sed kiel la portalo esprimas ideon. Enigitaj en la muroj de la klaŭstro, formante kvazaŭ muzeon, estas diversaj tomboj kaj skulptaĵaj fragmentoj el tombaj platoj, kapitejoj kaj bazoj de mozaiko el la XI jarcento, kiu estis en la ĉefaltaro. Alfiksita al la muro de la primitiva alo staras gotika tombo (XIV jarcento), kiun la tradicio montras kiel la tombon de Abato Oliva.

Jen ĉio, kio restas el la antikva monaĥejo Sankta Mario de Ripoll. La bildo de Sankta Mario, la korpo de Berenguer IV la Sankta, la fama biblioteko, la multvalora arkivo, la sacerdota kunvenejo, la palaco de la abato, la gastejo, objektoj, pentraĵoj, ĉio malaperis en aŭgusto de 1835 konsumita de la flamoj, kiujn vandala homamaso plivigligis dum tri tagoj.

La preĝejo de Sankta Petro, kiu troviĝas sur la placo Abato Oliva, devenas el XI jarcento; tiu de Sankta Eŭdaldo, patrono de la urbo, estas ovoforma, moderna kaj enhavas, krom diversaj barokaj altaroj, riĉan urnon, kiu gardas la mortocindrojn de la nomita sanktulo; estas ankoraŭ la preĝejo de la Puregulino kaj Sankta Mikaelo, kies fronta altaro estas el blanka kahelo kun desegnaĵoj de Llimona.

El la kultura aspekto oni devas rimarkigi kelkajn instituciojn kaj iel speciale la Arkivo-muzeon de Sankta Petro, kiu enhavas kelkajn rimarkindajn antikvajn dokumentojn, elokven-

taj atestantoj pri la historio de Ripoll. Tiu ĉi arkivo kunhavas bibliotekon kun mil ducent volumoj, inter kiuj elstaras ses pralibroj kaj meslibro de ĥoro, kiu estas netaksebla juvelo; ĝi enhavas ankaŭ rimarkindan kolekton de la loka gazetaro kaj fotografiaĵojn el Ripollès-regiono: kampardomojn, monumentojn, popularajn tipojn, manskribaĵojn, tipajn dancojn, legendlibron, morlibron, k. t. p. Kaj fine estas la ĉambroj de la Folkloro Muzeo, unika en Katalunujo, kiun ame kolektis kaj ordigis la senlaca serĉisto Tomàs Raguer. Multege da objektoj estas diŝmetitaj ĉie. Hoklampoj, fandpotetoj, lanternoj, kandelingoj, torĉingoj. Malnovaj pafarmiloj konstruitaj de la famaj armilistoj de Ripollès; feraĵoj produktitaj de la antikva kataluna forĝejo; iloj el kupro; laboriloj brilaj kaj eluzitaj, devenantaj el la metiejo de la lasta najlisto de la valo Ter-Freser. Kataluna ceramiko. Malnovaj uziloj el vitro. Antikva kostumaro. Kaj la fako de la paŝtistoj, la plej tipa kaj bela de la muzeo, en kiu oni vidas la kostumaron de la paŝtistoj, la feran kolĉenon, kiun portis la hundo por defendi sin de la lupo, tintilojn kaj tintilegojn por la brutaro kun ilia gracia muzikila kolĉeno kun primitivaj kaj originalegaj desegnaĵoj; kaj ankoraŭ kolekton da diversaj objektoj kiel kaseroloj, ter-potoj, galoŝoj, k. t. p., ellaboritaj de la paŝtistoj mem.

La Biblioteko Mata, kies direktoro estas sinjoro Zenon Puig, estas alia rimarkinda centro, kiu kun siaj 12,000 volumoj montras fervoran disradiejon de kulturo, kie povas sin nutri spirite la ripolla junularo. Ĝian fondon oni ŝuldas al la malavareco de Llambert Mata.

Ni fine mencias la Malaltan Lernejon de Artoj kaj Metioj, kiu kiel Biblioteko Mata, funkcias sub la aŭspicio de la Urbeŝtraro, institucio, kiu sukcesis forigi unu el la bezonoj ĉiutage pli sentataj kaj kie la amantoj de akcelo de sia scio povas akiri konojn kaj teknikan perfektigadon.

LA LEClONO SUR LA ŜlPO

En la pasinta jaro, kiam mi vojaĝis tra Eŭropo por partopreni en la XXVI-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Svedujo, mi enŝipiĝis en Roterdamo kune kun aliaj fremdaj samideanoj.

Dum la ŝipvojaĝo okazis ofte esperantaj lecionoj sur la ferdeko. Al mi ŝajnas ankoraŭ vidi la lernantajn vojaĝantojn ĉirkaŭi la profesoron, francan fraŭlinon, kiu ridetante instruis laŭ rekta metodo.

Gelernantoj el la plej diversaj landoj kaj el la plej diversaj aĝoj kune kaj laŭte respondis la demandojn de la profesorino, kiu per kreto skribis tuj la vortojn sur la nigra tabulo, kies fono estis la bluo de la maro.

La kapitano de la ŝipo, ofte rigardis la lerneman grupon kaj eĉ kelkfoje alproksimiĝinte al la simpātia rondo, aŭskultis lecionon. Mirigita, li promesis lerni Esperanton kune kun sia amata edzino, eksflegistino kiu laŭ propra rakonto savis kaj ekkonis lin dum la mondmilito. Poste, ili geedziĝis.

La romantika kapitano, kies okuloj brilis kaj lian blondan hararon movis la maraero, ĉirkaŭprenis sian edzinon kaj tuj aŭdis ovacion el ĉiuj spontaneaj gelernantoj.

Tiamaniere finiĝis unu el la lecionoj sur la ŝipo.

RAMON CABEZA

Partopreno Esperantista en la Teknikajn Kongresojn!

La Direkcio de nia movado devus plenumi gravan taskon por nia propagando kaj por efikado en la praktikon: sciigi la esperantistaron pri estonta okazo de Internaciaj Kongresoj kun plej multaj detaloj por deca partoprenigo de la esperantistaj fakistoj. Ekzemple, en Barcelona, okazos, fine de majo nunjara, Internacia Kongreso de la P. E. N. Klubo kaj Internacia Kongreso pri arto kaj tekniko de anoncado. En ĉi-ties komitato estas malnova samideano Joan Abeyzon, kiu de antaŭ longe ne plu militas por nia afero, sed li ne ĉesis esti samideano, kvankam pasive. Kaj certe bonvole kaj eĉ revigliĝe estus akceptinta partoprenon aŭ informpeton de esperantistoj. La bona okazo nun forpasis por niaj samideanoj,

kiujn interesus partopreni tiujn Kongresojn, kaj forpasis, bedaŭrinde por nia afero, la bona okazo efiki por Esperanto tra partopreno pli malpli efektiva de fakuloj esperantistaj en tiujn Internaciajn Kunvenojn.

Ĉu ne estas rimedo per kiu la Direkcio de nia movado informiĝu pri estonta okazado de Internaciaj Kunvenoj, kaj sciigu pri ili la esperantistojn? Certe ĉiuj niaj gazetoj publikigus tian informadon de la Direkcio de nia Centra Oficejo.

La proksiman julion okazos en Londono Internacia Kongreso pri Fonetikaj Sciencoj. Mi informiĝis pere de katalunlingvaj gazetoj, antaŭ du monatoj. Dank'al tio mi eble partoprenos ĝin kaj aludos favore al Esperanto. Ĉu ne estus kelkaj esperantistoj el diversaj landoj, kiuj tion ankaŭ farus, se per niaj Esperantaj gazetoj nia samideanaro estus frutempe informita, ĉefe se la Direkcio de nia Movado tion rekomendus?

La proksiman aŭguston okazos en Frankfurt a/M. Internacia Kongreso pri Stenografio. Mi devis pri tio informiĝi per germanaj ĵurnaloj. Ĉu kelkaj stenografistoj esperantistaj ne influus favore al Esperanto, per ia ajn partopreno aŭ kontaktiĝo kun tiu Kongreso Internacia, se ili sciis, pri ĝi, sufiĉe antaŭtempe?

La Internaciaj Kunvenoj estas plej efikeblaj medioj por Esperanto. Eĉ ni devus laŭeble instigi, se ne organizi mem, teknikajn kaj ĉiuspecajn internaciajn kongresojn, ne kiel esperantistajn, sed kiel fakajn aŭ ĝeneralajn, simple por akcepti aŭ uzi kaj rekomendi Esperanton inter la oficialaj lingvoj.

Ĉu vi ne tiel opinias, kolegoj kaj batalantoj por Esperanto?

DELFI DALMAU

SANKTA NIKOLAO VOLIS MODERNIĜI

Kelkaj homoj suspektis, ke en 1932 S-ta Nikolao certe jam estos mortinta. Sed kial? Kompreneble ne! Vere, li estis jam maljunega kaj iom malrapide pensanta. Sed morti? Tute ne!

Male. Li klopodis per ĉiuj rimedoj iri kun la tempoprogreso. Tial jam en antaŭaj jaroj li estis komencinta variigi siajn donacojn. Vere, la afero ne estis facila por tia maljunulo kia li, iomete amikiĝi kun tia amaso da teknikaĵoj necesaj jam por simpla radio-maŝino. Kaj la cetera amasego da teknikaj ludiloj! Nu, laŭeble bone li sciis jam diferencigi la korpon de submarboato de zepelino, sed finfine li lasis la tro subti-

lajn objektojn al sia helpanto. Sed en ĉi tiu jaro 1932 li intencis alporti ion nepre tute novan. Sed kion, kion? Dum semajnoj li cerbumante rompis sian grizan kapon: senrezulte. Sed mallonge antaŭ la festo li havis genian ekpenson: eble el la radio li povos ricevi ian instigon aŭ ideon. Li grumbliis al si mem, ke nur tiel malfrue li pensis pri tio.

Por ke li ne forgesu, li tuj eniris la ĉelon de la ĉefanĝelo S-ta Rafaelo, kiu priservis la ĉielan radio-stacion. «Volonte», diris Rafaelo, aŭskultinte la deziron de l' bona maljunulo. «Kiun stacion?» Tio estis indiferenta al Nikolao. Li surmetis tie kuŝantajn aŭskultilojn. Post mallonga tempo li ree formetis ilin, kaj kontenta rido ludis sur lia vizaĝo.

Granda surprizo regis en ĉi tiu jaro ĉe ĉiuj infanoj pro la strangaj donacoj de S-ta Nikolao. Por multaj tio estis konataj objektoj, sed por pli multaj ili estis tute fremdaj. Ĉiukaze ili taŭgis por kelktempa ludado. Poste ili spertis la sorton de tiom aliaj ludiloj: ili estis forĵetataj en angulon.

Sed kio estis okazinta? Kian genian sugeston estis ricevinta S-ta Nikolao per radio! Ni tuj aŭdos!

Nikolao havis la bonŝancon kapti ĝuste la finparton de prelego, eĉ pli: de prediko por aerprotekto, en kiu oni varme rekomendis al ĉiuj, granduloj kaj malgranduloj, teni gasmaskojn en la provizejo. «Nu», diris al si Nikolao, «se oni tion disvastigas per radio, tiam devas esti grava afero. Do, nunjare mi donacos gasmaskojn al la malgranduloj». Kaj li jam antaŭĝojis pro sia propra modernigo kaj aktualeco.

Fulmrapide li transmetis sin al Berlino en la magazenon de granda gasmaska firmo. «Mi deziras gasmaskojn», li diris al la fabrikanto. «Kiom?» redemandis tiu. Kaj kiam li aŭdis la respondon de Nikolao: «Por ĉiuj infanoj de la tero», li apenaŭ povis kaŝi sian egan ĝojon pro la giganta negoco aperanta. Tuj li ekprenis telefonan aŭskultilon kaj ordonis ĉion necesan, por ke la mendo estu efektivigata laŭ la deziro de tia bona kliento.

Ĉio funkciis bonege, tre kontentige; tion ni aŭdis jam antaŭe. S-ta Nikolao, post plenumo de sia vastega tasko, reiris ĉielen, subridetante en sian blankan barbon kaj admirante sin mem pro tio, ke li ĉi-jare sukcesis esti tiel moderna. Vi do pavas imagi, kiom ega estis lia surprizo, kiam tie akceptis lin lia amiko, S-ta Rafaelo, kaj senparole kondukis lin al la ekrano de la estonteco. «Mi volas montri al vi ion», li diris al la barbulo, kaj ĉi tiu scivole eksidis antaŭ la blanka tabulo.

Rafaelo iom manipulis en siaj aparatoj. Subite Nikolao re-

vidis siajn infanojn en tutmondo; ili pliaĝiĝis. Panike ili diskuris tien kaj tien, sed ĉiumomente falis unu el ili. La pli multaj el ili portis lian donacon el la jaro 1932: gasmaskon. Sed la tiama formato konvenis jam nur al la etuloj; ĉe la aliaj la maskoj ne hermetike enkadris la kapon. Tial el ili falis la plej multaj, falante forŝirante de siaj vizaĝoj la maskojn kaj tuj sekve alprenante la aspekton de sufokitoj.

«Ne, ne, tio estas terura, terura», balbutis S-ta Nikolao. «Tio ne povas esti! Vi mistifikas min en tre malbela maniero!» Kaj, ne atendante respondon, li sagrapide alvenis ĉe la Berlina fabrikanto. Preskaŭ senspire li rakontis al li sian ĵusan travivaĵon. Li tremis, teruro ankoraŭ skuis lin. Sed la fabrikanto diris tute sen ekscito: «Nu, trankviliĝu! Unue, ĉio estas estonta fantaziaĵo; due, se ĝi estus fakto, oni verŝajne aplikis alian specon de gaso ol tiun, kontraŭ kiu protektas la de vi donacitaj maskoj. Vi devus scii, ke preskaŭ por ĉiu gaso ekzistas speciala filtrilo, kiun oni antaŭe devas enmeti en la maskon. «Sed se oni antaŭe ne konas la specon de l' uzotaj gasoj?» — «Tial mi ja liveris al ĉiu masko serion da filtriloj, plene sufiĉantaj por ĉiuj nun konataj gasoj!» — «Sed por enmeti unu, oni ja devas antaŭe malfermi la maskon?» — «Efektive. Tiucele oni eniru gas-sekuran subterejon».

S-ta Nikolao ne povis tiel rapide pensi. Li nur sentis ke tiuj protektiloj reale estas tute senvaloraj, ĉar ili protektas nur kontraŭ unu certa speco de gaso. Kaj krome: Kion fari, se la masko fariĝis tro malgranda por intertempe plukreskinta infano?

Lia kapo ekdoloris. Konstante li ĝemis: «Ho, tiuj homoj, ho, tiuj homoj!» Kaj kiel ĉiam, li ree iris al sia klera amiko Rafaelo. Tiu detale klarigis al li ĉion. Fininte la teknikan parton, li aldonis: «Kaj nun mi devas ion konfesi al vi. Vi estas bonkora infan-amiko. Via plezuro estas donacadi. Ni ne volis, ĝis nun, maldolĉigi al vi tiun ĝojon. Sed vidu, ĉi tie supre ni ne plu okupas nin pri la homoj. Ili fariĝis diabla gento. Ili fariĝis bestoj unuj kontraŭ aliaj, ne, pli malicaj eĉ. Ĉu en paco, ĉu en milito, ĉiam ĉiu el ili embuskas, insidas malutille al alia. Ĉu estaĵoj elpensantaj tiajn kruelaĵojn kiaj estas gasatakoj, entute milito kun ĉiaj siaj sekvoj, meritas nian amon? Antaŭ nelonge ili furiozis en la tuta mondo unuj kontraŭ aliaj. Sed eĉ nuntempe ili ne prudentiĝis; ili nenion lernis, ĉion forgesis».

Kion povis respondi la bona maljuna sanktulo? Li silentis, kaj ŝajnis, ke io akva ekbrilis en liaj okuloj. Li ja estis jam vere tre maljuna. Fine li tamen kun peno diris: «Do, venon-

tan jaron ankaŭ mi ne plu povos iri al ili», kaj seka singulto tremigis lian kadukan korpon, ĉar li vere amis homojn kaj homidojn.

Verkita originale en Esperanto, de

JOSEPH F. BERGER

(Premiita en Vendrell.)

ENLANDA MOVADO

Barcelona. — Dank' al la klopodoj de K. E. F. komenciĝis la 10-an de aprilo kurso de Esperanto en «Escola Normal de la Generalitat», sub la gvido de profesoro Samuel Roca. Ĉe la inaŭguracio faris tre interesan propagandan paroladon profesoro Delfí Dalmau. Partoprenas ĉirkaŭ 20 lernantoj. Estas rimarkinde, ke ĉiuj partoprenantoj estas studentoj de la alta lernejo de instruistoj.

En la sidejo de Zamenhof-Instituto komenciĝis la 30-an de aprilo nova kurso kun sukceso. La sama Societo kun la celo diskonigi la veron pri la diversaj projektoj de lingvo internacia, lastatempe tendence propagandita kiel kutime de kelkaj idistoj, invitis per la gazetaro la publikon por pruvi, ke el la multegaj ĝis nun aperintaj projektoj nur Esperanto estas la sola praktika solvo.

Terrassa. — Por dece festi la arĝentjubileon de sia fondiĝo, la fervora grupo Lumon organizas por la 26-a de majo eksterordinarajn festojn. Oni invitis ĉiujn esperantistojn de la lando kaj espereble granda sukceso kronos la taskon de niaj terrassaj pioniroj, kiuj dum multaj jaroj estis la gvidantoj de la kataluna movado kaj milfoje pruvis sian fervoron kaj sindonemon por la Zamenhofa idealo.

Vic. — La hejmo de nia grupano Sro. Jaume Guix kaj de lia edzino Sino. Anna M.^a Fors, ĝojiĝis per la alveno en la mondon de ilia unua filo, nomata Eŭdaldo. La geedzojn kaj tiel ankaŭ iliajn respektivajn familiojn ni kore gratulas.

—Multaj membroj de Esperanta Grupo deziras ĉeesti la Kongreson en Ripoll, ankaŭ kunportante la flagon de la grupo por tiel kontribui al pli plena graveco de nia nunjara ĉeffesto. — La Korespondanto.